

★ la informilo

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

ESPERANTO - FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

*Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture*

27, rue de la République, 54000 NANCY F
PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série
trimestriel
1^{er} tr. 1979
N° 25



abonnement
un an: 12F
UNU JARO: 12F
(8 INTERN. KUPON.)

ANTO....FLASH★ESPERANTO.... FLASH★ESPERANTO

CONGRES FRANCO-BELGE d'ESPERANTO à LILLE ★

Du 27 avril au 1er mai la grande métropole du Nord sera le point de ralliement des participants au 71ème Congrès National de l'Union Française pour l'Espéranto d'une part et du 61ème Congrès de la Fédération Espérantiste Belge d'autre part. Toute la panoplie des activités inhérentes à ce genre de manifestation est offerte aux congressistes. Les travaux officiels seront agrémentés d'une soirée-variétés avec concours doté de nombreux prix, d'une soirée théâtrale avec le TESPAS (la troupe parisienne de renommée internationale), d'excursion à Brugges. Un tramway "rétro" construit en 1910, promènera les congressistes à travers la ville.



L'ESSOR DE LA LITTÉRATURE ESPERANTISTE ★

C'est à un éditeur belge que nous devons l'une des initiatives les plus intéressantes dans le domaine de la diffusion des oeuvres mondiales écrites en espéranto: la création d'un CLUB INTERNATIONAL DU LIVRE.

Au rythme d'un ouvrage par mois, les éditions STAFETO vont ainsi pouvoir offrir à leurs adhérents, et ce pour un prix abordable,

**STAFETO**
un club
du livre
★ **ESPERANTO**

une collection d'ouvrages variés, traductions et oeuvres originales. Le premier volume est un roman policier de Johan Valano, intitulé "Est-ce qu'il a suffisamment freiné?". Cet auteur suisse, très connu dans les associations internationales - il est entre autre traducteur polyglotte à l'Organisation Mondiale de la Santé- a vu décerner à son premier roman "Faites-vous de la cuisine chinoise?", le titre de LIVRE DE L'ANNEE.

Tous renseignements sur le fonctionnement de ce club à l'adresse suivante: Editions STAFETO, Heideweg 20, B 2120 SCHOTEN Belgique.



D deutsch E español F français GB english
I italiano H magyar P portugûês PL po polsku
YU slovensko-hrvatski ☆ esperanto

02.15 ♀ Rencontre avec Jean Paul II
07.15 ♂ Esperanto
21.05 ♂ Religia penso. Semajnaj informoj pri la katolika mondo

RADIO-VATICAN ET L'ESPERANTO ★

A la première diffusion hebdomadaire en langue internationale du dimanche soir à 21h05 (GMT+1 pour la France) Radio-Vatican vient d'en ajouter une seconde, chaque jeudi à 7h15. Cette émission s'insère dans le 1er programme destiné à l'Europe dans les bandes des 19, 25, 31, 41 et 49 m ondes courtes.

UN NOUVEAU JARDIN ZAMENHOF ★

C'est celui inauguré le 17 décembre 1978 à Saint-Avertin, près de TOURS, en présence du Conseil Municipal et du groupe espérantiste local.

Le 1er avril c'est en Belgique à Solre-sur-Sambre qu'une rue "espéranto" sera baptisée en présence de la municipalité et des clubs locaux.

PINOCCHIO JOUÉ... EN ESPÉRANTO! ★

Les aventures du petit garçon articulé, connues des garçons et filles du monde entier, viennent de faire l'objet d'une présentation théâtrale de deux heures par les marionnettistes du théâtre d'état de VROCLAW (Pologne).

Cette troupe qui participe à de nombreux galas internationaux a reçu le 1er prix d'un jury espérantophone pour la perfection obtenue dans l'utilisation scénique de la langue espéranto.

LE BILINGUISME CANADIEN ET SES DIFFICULTES ★

L'antagonisme linguistique au Canada n'est pas sans poser de graves problèmes à tous les degrés de la vie professionnelle de tous les jours. Le Ministère de l'Education de la province de Colombie Britannique vient de doter ses cours de langue par correspondance d'une "initiation à la langue espéranto" composée de 18 leçons et d'une cassette enregistrée de 90 minutes... le tout pour 15 dollars canadiens, méthode testée et agréée pour son efficacité immédiate.

On ne peut que songer à l'argent dilapidé par des millions de personnes qui, après des années d'effort ne parviennent qu'à balbutier un anglais rudimentaire.

 ESPERANTO et POESIE ★

Dès sa création l'espéranto est apparu comme un outil idéal de traduction pour les oeuvres poétiques quelles qu'en soient les origines linguistiques. Il serait fastidieux d'énumérer tous les auteurs français par ex-mple qui ont vu leurs oeuvres mises à la disposition des lecteurs du monde entier grâce à leur parution en espéranto.

Trois nouveaux ouvrages viennent encore d'enrichir le fonds commun du trésor poétique international. Il s'agit des "24 sonnets" de Louise Labé, poétesse du 16ème siècle, auteur ... des plus beaux vers passionnés du monde..., des "Chimères" de Gérard de Nerval, un des ... moments les plus troublants de notre poésie... et d'une "anthologie des poèmes de la Renaissance".

Présentés tous trois en édition bilingue -les deux derniers traduits par la plume magique de Gaston WARINGHIEN, l'un des meilleurs stylistes espérantistes actuels. Ces recueils méritent une place de choix dans la bibliothèque de l'amateur éclairé.

 HONGRIE: UNE DECISION RETENTISSANTE... ★

Le Ministère de l'Education vient en effet de programmer officiellement l'enseignement de la langue internationale dans tous les collèges du pays.

Cette décision qui entrera en vigueur dès 1981 confère ainsi à l'espéranto des droits égaux à ceux des autres langues susceptibles d'être choisies par les élèves de 14 à 18 ans fréquentant ces établissements.

 UNE RANDONNEE CYCLISTE INTERNATIONALE ★

Due à l'initiative d'un groupe d'espérantistes allemands, ce rallye d'un style nouveau, organisé à l'intention des "jeunes" -auxquels pourront bien entendu se joindre des "moins jeunes"- doit conduire les randonneurs de Darmstadt aux rives de la Meuse, à travers le Parc Naturel de Lorraine, du 6 au 18 août 1979. Les espérantistes intéressés (campeurs de surcroît) peuvent s'adresser à :

Eki WOITE, An der Kirche 33, 6115 Münster/Darmstadt (RFA)



 LES ACTIVITES DE LA MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE ★

Le château de Grésillon (49150 BAUGÉ Fr.) vient de diffuser son programme pour l'année 1979.

Une semaine aux vacances de Pâques, du 11 au 18 avril pour les enfants accompagnés puis 3 séjours aux vacances d'été, du lundi 2 juillet au samedi 1er septembre, séjours axés sur des conférences, des cours de degrés divers et des activités manuelles et artistiques.

 LE CONSEIL GENERAL DE MEURTHE-et-MOSELLE SE PRONONCE EN FAVEUR DE L'ESPERANTO ★

Au cours de sa séance de janvier dernier, le Conseil Général de Mthe-et-Mlle a approuvé une motion très importante que nous publions dans son intégralité:

après
celui de
la Moselle...

LE 26 Janvier 1979

CONSEIL GENERAL
de
Meurthe - & - Moselle

LE CONSEIL GENERAL DE MEURTHE- & -MOSELLE

CONSIDERANT

- que les relations internationales favorisées par les progrès de la technique moderne et des moyens de communication sont devenues une réalité quotidienne, le rapprochement physique des peuples est un fait accompli,
- que chaque peuple désire conserver sa propre culture, qui est son identité, et que la diversité de celles-ci constitue la richesse du monde et la valeur de la vie,
- qu'une véritable entente et une solide union ne peuvent être établies que sur une mutuelle compréhension dont dépendent le bonheur et l'existence même des peuples, à travers la paix du monde, avec les peuples et le monde qui ont de plus en plus besoin d'une langue de communication au niveau mondial, que cette langue ne peut être aucune des langues nationales pour des raisons politiques, économiques et culturelles,
- que le multilinguisme dans les relations internationales est une source souvent d'erreur et toujours de dépenses considérables,
- que depuis près d'un siècle, la langue internationale Espéranto a fait, dans tous les domaines, ses preuves de clarté, de précision et de facilité. Répandue sur les cinq continents, elle compte des millions d'utilisateurs, parmi lesquels des personnalités de premier plan dans les domaines de la politique, des sciences et de la culture. Qu'elle prouve ainsi être parfaitement apte à remplir ce rôle de langue auxiliaire neutre,
- que l'UNESCO a voté une résolution favorable à l'usage de l'Espéranto, et a reçu de cinq états d'Europe une demande officielle pour que l'utilisation de la langue internationale Espéranto soit étudiée,
- que plus de 225 députés français ont fait connaître leur volonté que la langue internationale Espéranto soit considérée dès maintenant, comme indispensable à la coopération des peuples d'Europe,
- que des résultats encourageants sont acquis depuis l'introduction de la langue internationale Espéranto, comme matière à option, dans les Facultés des Lettres de CLERMONT-FERRAND depuis 1969, d'AIX-en-PROVENCE depuis 1970, et dans plus de trente Universités du monde,
- que plusieurs expériences dans le monde ont prouvé que la structure de la langue internationale Espéranto préparait et facilitait la compréhension lors de de l'enseignement des autres langues,

DEMANDE A MONSIEUR LE MINISTRE DE L'EDUCATION

- de procéder à une enquête pour déterminer le pourcentage d'élèves qui après 5 à 7 ans d'étude d'une langue étrangère, sont en mesure de s'exprimer aisément, oralement et par écrit, dans la langue en question,
- de soumettre au vote de Messieurs les Députés un projet de loi reprenant le texte de la proposition n° 1667 de la précédente législature tendant à inclure la langue internationale Espéranto dans l'enseignement secondaire comme langue facultative,
- d'envisager un enseignement expérimental de l'Espéranto qui, coordonné entre les Etats, permettrait une utilisation beaucoup plus rationnelle du temps, de l'argent et de l'énergie intellectuelle des sociétés humaines, sans porter préjudice à l'enrichissement culturel que représente l'acquisition d'autres langues.

INFORMADO AL DEPUTITOJ ★

Sekve al alvoko en la lasta n^o de LA INFORMILO, Sr^o Maurice CROCHET (51 EPERNAY), Sr^o Edmond LUDWIG (68 STOSSWIHR), Sr^o Jean DEMISSY (55 MONTMEDY), Sr^o Bernard VIVIER (54 JOEUF) anoncis, ke ili jam kontaktis sian lokan deputiton aŭ ke ili pretas tion fari.

Ŝajnas, ke bone programita agado estus nun la jena:

- en departementoj 57 kaj 54, kies departementaj konsilioj voĉdonis respektive en 1978 kaj 1979 rezolucion favoran al esperanto, oni kontaktu nun la deputitojn, liverante al ili la tekston de la koncerna, favora rezolucio kaj petante, ke ili subtenu la novan leĝproponon, baldaŭ deponotan ĉe la Parlamentano.

- en ĉiuj aliaj departementoj, prefere oni unue kontaktu unu aŭ du lonsilianojn por instigi, ilin deponi similan projekton de rezolucio al sia departementa konsilio. Mi substrekas, ke en Mozelo Sin^o NAU sukcesis voĉdonigi rezolucion kontaktante la prezidanton de la konsilio, dum en Meurthe-et-Moselle ni kontaktis 2 konsilianojn (Profesoron HURIET, kiu apartenas al la "prezidenta plimulto" kaj Sr^on GROSCOLAS, socialisto) Ambaŭ kune prezentis la projekton.

J.-P. COLNOT



ADRESOJ DE ESPERANTO-INSTRUANTOJ EN LA TELEFONA JARLIBRO

Laŭ instigo de UFE kaj de IPTEA (Internacia Esperanto-Asocio de Poŝtistoj) ni alvokas ĉiujn niajn membrojn, kiuj posedas privatan telefonon por ke ili petu, ke la Poŝta Administracio senpage enpresu ilian nomon en la "flavan" profesion parton de la telefon-jarlibro por 1980, sub la subrubriko "PROFESSEURS d'ESPERANTO, code 65-91-70 N"

Ili skribu al AGENCE DES TELECOMMUNICATIONS servante ilian loĝlokon.

Tio koncernas ĉiujn gesamideanojn, kiuj posedas bonan scipovon de la lingvo. Se ili mem ne deziras instrui la lingvon, ili povas fariĝi korespondantoj de nia perkoresponda kurso, informi eventualajn inform-petantojn pri tiu kurso kaj pri la eventualaj najbaraj parolaj kursoj, laŭ la informoj aperantaj en nia bulteno; ili ankaŭ povas komuniki al ni la adresojn de la interesigantoj por ke ni informu ilin per letero.

Cirkuleroj pri la perkoresponda kurso kaj flugfolioj pri Esperanto estas je la dispono de ĉiuj gesamideanoj pretaj kunlabori.

J.P. COLNOT - 15 rue de Lavaux - 54520 LAXOU

partoprenu !!

PRINTEMPAJ S O G E L O - TAGOJ *

S O G E L O (Sud-Okcidenta Germana E^o-Ligo) invitas vin al siaj "printempaj tagoj" en la bel Naturamika Domo "FUCHSRAIN" apud Stuttgart la 28/29ajn de aprilo 1979 (kun ebleco restadi ĉi-tie ĝis la 1a de majo).

Interesa programo kun prelegoj, urbo-vizito, aŭtobusa veturo al Svaba Alpo, vizito de vinkelo, ktp.

Petu pli detalajn informojn skribante al TURISTA ASOCIO de NATURAMIKOJ, E^o-FAKO, Neue Str. 150 - D6601 STUTTGART

LA 13a KULTURA SEMAJNFINO EN SARLANDO *

Ĝi okazos la 5/6ajn de majo 1979 kiel kutime en kastelo "JUNKERWALD" en Blieskastel Niederwörzbach (ĉirkaŭ 20 km oriente de SAARBRUCKEN) Oni povas ĉeesti jam de la 4a de majo.

Tri kursoj estas proponataj: A/ por komencantoj B/ por progresintoj (gvidos ĝin pastro KINDLER el Luksemburgo) C/ por spertuloj (Doktorino Marjorie BOULTON prezentos la verkaron de Gyula BAGHY)

Aliĝkotizo -15 GM-, tranoktado en 2-4 litaj ĉambroj -13 GM-, ĉiu manĝo ĉirkaŭ 10 GM.

Interesatoj bonvolu turni sin al SARLANDA ESPERANTO-LIGO
Schulstr. 30 D6601 SCHEIDT

NOVAĴOJ EL LA CHAUX-de-FONDS (SVISLANDO) *

La aktiva "Kultura Centro Esperantista" en La Chaux-de-Fonds festis sian 10an vivjaron la 2/3ajn de decembro 1978 per agrabla kunveno, en kiu ĝi inaŭguris la du unuajn domojn aĉetitajn por starigi la tiel nomatan "Gastejon Edmond PRIVAT". (estas antaŭvidata la aĉeto de 7 domoj entute por la plena disvolviĝo de la gastejo).

Nun disponante pri propraj domoj, la "INTERNACIA FERIA ALTLERNEJO" estos inaŭgurita dum la "E°-tagoj", kiuj okazos la 2/3/4ajn de majo 1979.

Estas planitaj (inter multaj eroj): literatura vespero kun Johān Valano kaj Giorgio Silfer, kabareda vespero kun Olivier Tzaut, vizitoj de CDLI, de la horloĝa muzeo, kolokvo pri porinfana literaturo, ne forgesante konversacian rondon por komencantoj kaj tipe ĵurasan... "fonduon"!

Aliĝo kaj tranoktado moderprezaj. Petu informojn (aldonante respondkuponon) al

Internacia FERIA Altlernejo

Poŝtĉfako 771 CH2301 La Chaux-de-Fonds

EĤOJ el nia 8a staĝo ★

el Jacqueline TISSIER - DIJON

"...tre plezurigis min la semajnfina organizado... la etoso estis kiel eble plej fervorega... tre surprizigis min la multnombro da junaj gepartoprenantoj... mi multe ŝategis la originalecon de la kurso de S-r° TZAUT, kies gitaro forgesigis al mi la gramatikajn malfacilaĵojn!"

el F-in° LEPEIX - STRASBOURG

"...la etoso estis tre amika, tre simpatia ĝenerale, kvankam la diversaj grupoj estis iom disigitaj... tiaj staĝoj estas tre bona okazo por renkonti najbarajn esperantistojn... En la kurso C mi ŝatis la debaton pri la ebleco krei semajnan gazeton en E°... al mi plaĉis ankaŭ la aserto de pluraj, ke Esperanto ne estas celo sed ilo."

el S-r° CROCHET - EPERNAY

"...nova membro de nia Federacio mi konsideris kiel devon konatiĝi kun la regiona centro de la diversaj grupoj aŭ izoluloj... ĉe la kurso C mi -plezure- konstatis, ke ĉiuj partoprenantoj uzis nur la internacian lingvon dum la kursa tempo sed ankaŭ dum la paŭzoj... eĉ inter samnaciuloj! Antaŭe mi rimarkis la belan aspekton kaj taŭgan enhavon de la inform-bulteno... sed tiu staĝo elmontris la bonegan organizadon kaj la gravan sindonemon de la federaciaj gvidantoj..."

el S-in° GRAMPP - STRASBOURG

"mi opinias, ke Sankta PETRO estas favora al E°... sabate matene la suno ekaperis kaj samtempe malaperis eĉ la plej malgranda ero de glaciaĵo!... mi konfesas, ke mi aliĝis al tiu kurso B pro scivolemo kaj mi timis, ke temos pri muziko kaj sur tiu kampo mi ja ne estas kompetenta. Surprizo kaj granda kontento: S-r° Tzaut pritraktis gramatikajn malfacilaĵojn... la tuto miksitita kun kantado!... mi ne volas forgesi raportojn pri la libroservo, kie multnombraj samideanoj trafoliumis variajn librojn kaj fine aĉetis unu aŭ pluraj el ili. S-in° COLNOT prenis sur si la taskon pri la vendado kaj laboris, eĉ laboregis dum la tuta tago kun ĉarma rideto... grandan dankon al la organizintoj..."

9^{ème} stage de l'espéranto parlé

9^a staĝo de parolata esperanto

→ 16^{an} kaj 17^{an} de junio 1979 ←

en NANCY, junuldomo "Philippe Desforges (MJC)
27, rue de la République

Montriĝas pli kaj pli necese, por ĉiuj esperantistoj aŭ lernantoj en Orienta Francio, plej parte izolitaj en sia urbo aŭ vilaĝo, kaj ofte lernintaj Esperanton nur perkoresponde, renkontiĝi okaze de semajnfinaj staĝoj. Dum tiuj staĝoj, dank' al rektmetodaj lernolibroj diversgradaj, ĉiuj havas la eblecon paroli en Esperanto. La franclingvaj gramatikaj klarigoj estas minimumaj en la kursoj A1 kaj A2, preskaŭ ne ekzistas en la kurso B.

Ni invitas samtempe ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn!) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni por praktiki kune la internacian lingvon.

ESTOS 4 KURSOJ

- KURSO A-1 → por tuj komencontoj
- KURSO A-2 → por ĵus komencintoj, kiuj atingis proksimume la duonon de la unuagrada kurso
- KURSO B → por tiuj, kiuj finlernis la unuagradan kurson: ili povos simple babili inter si helpe de la libro "al Toronto"
- KURSO C → la lingvoposedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvoposedon. (La studdokumentojn ricevos ĉiu partoprenanto komence de la staĝo) Bonvolu turri!



★ aliĝilo ★

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii kaj sendi kun antaŭpago de 20F por ĉiu persono, kiel eble plej frue, kaj antaŭ la 2a de junio 1979 al

S-n^o J.P. COLNOT
15 rue de Lavaux, 54520 LAXOU
PCK^o 1272-21 L NANCY

(bonvolu krucumi laŭdezire en la eta kvadrato)

Sr^o S-in^o F-in^o nombro de personoj: _____

NOMO: _____ ANTAŬNOMO: _____ NOMO k. ANTAŬNOMO de la akompanantaj personoj: _____

ADRESO: _____ Naskiĝdato de junuloj sub 15 jaroj: _____

Tago kaj horo de alveno: _____

Mi rezervas lito(j)n en ĉambro kun lito(j) sabate vespere.

Suplementaj noktoj (eventuale): _____

Mi rezervas manĝo(j)n sabate vespere por _____ personoj, dimanĉe tagmeze por _____ personoj.

Aliaj manĝoj (eventuale): _____

Mi partoprenos en kurso A1 A2 B C bonvolu turni!

PROGRAMO de la 9a STAĜO

SABATON, 16an de junio = bonvolu alveni antaŭ la 14a30, por ke la kursoj povu komenci-
ĝi akurate je la 15a. Jen la laborritmo: kurso (45 minutoj), ripozo (15 minutoj) ĝis la 18a45
Tiam funkcios libroservo. Je la 19a30, komuna vespermanĝo. Vespere ni ĝuos tre amikan kunĉe-
estadon kun diapozitivoj, kantoj, ktp...

DIMANĈON, 17an de junio - matenmanĝo (atentu! nur ĝis la 8a horo!)
ni "parolos" de la 9a ĝis la 11a45 (samritme kiel sabate)
poste libroservo kaj ... tagmanĝo je la 12a30
posttagmeze povos okazi diskutoj (proponu temojn!), amika
kunestado, urbo- aŭ muzeovizito

Eblas trapasi ekzamenon nome: ATESTO PRI LERNADO }
" PRAKTIKA LERNADO } principe dimanĉe
" KAPABLECO (skriba parto) } matene

Ankaŭ eblas restadi en NANCY antaŭ kaj post la staĝo, sed bonvolu precizigi tion!

LA NOMBRO DE LA LITJOJ ESTAS LIMIGITAJ JE 50

ALIĜU SUFIĈE FRUE !!

KOSTOJ

Aliĝotizo 12 F por ĉiu persono. La Federaciaj Membroj, Abonantoj al LA
INFORMILO kaj iliaj familianoj, la gejunuloj sub 15 jaroj
pagos nur 6 F

Manĝo (tagmeza aŭ vespera) 13F Tranoktado kaj matenmanĝo (por unu persono)
rezervitaj por la unuaj aliĝantoj En du-lita: 23F

(En unulita ĉambro: 28F
En 3- 4-lita: 20F)

Priatentu! Tiuj prezoj validas ekde la 1a de septembro 1978.
Eta plialtiĝo ebla.



Mi antaŭmendas la jenajn verkojn: (Kursoj A1, A2, infanoj) Junulkurso 20F
suplemento 4F

Plena vortaro 40F

Guide et programmes des
examens 5F

Kurso B libro "Al torento" 13F

Kurso C (la studdokumentoj estos surloke
disdonataj)

Por ĉiuj (laŭdezire tutevidente!!...) Lexique Fondamental E°-Français 9F

Dictionnaire Pratique (F.E° kaj E°.F) 32F

Ni konsilas al la partoprenantoj
en kursoj B kaj C posedi la 2

Dictionnaire Français- Esperanto 40F

verkojn POR LA PRAKTIKANTOJ 20F

Grand Diction. Esperanto-Français 60F

PAŜOJ AL PLENA POSEDO 21F

(eventuale) Mi deziras trapasi ekzamenon atesto pri lernado

atesto pri praktika lernado

atesto pri kapableco

(La libroj menditaj estos je via dispono la 16an de junio)

NIA VIVO EN...

STRASBURGO ★

La E^o-grupo regule kunvenas ĉiun duan mardon monate. S-in^o Muller gvidas kurson por la "3-a aĝo" en Universitato.

Ni jam nun invitas ĉiujn esperantistojn denove al E^o-renkontiĝo orientregiona en Vogezoj je la Hingrie, la 12/13ajn de majo (Valo de Ste-Marie-aux-Mines apud Lièpvre Rombach-le-Franc.)

S-in^o FERREZ donacis la eldonrajton kaj la reston de la stoko de la bona, simpla E^o-kurso "Hubert FERREZ" al la Strasburga Grupo aŭ al la Orient-franca Federacio, koregan dankon al ŝi.

METZ ★

En la klubo de la liceo FABERT estas entute 22 anoj el kiuj 15 gekomencantoj el la 23 ĉi-fare varbitaj.

En la urba E^o-klubo estas 19 anoj, plenkreskuloj, el kiuj 8 novaj ĉi-fare varbitaj.

Ekspozicio, kies titolo estis "ESPERANTO VIVANT, DE METZ A SAMARCANDE" okazis en la Junulara kaj Kulturo Domo S-ta Marcelo en Metz de la 5a ĝis la 9a de marto. Ĝi montris diversajn E^o-gazetojn kaj librojn, kaj paneloj prezentis objektojn ricevitajn el la grupo de Samarcande (Sovet-Unio). Unuhora sonbendo senĉese rekomence komentaris la ekspozicion. Kulmino de tiu E^o-Semajno estis vendrede vespere (9an de marto) prezento de E^o-kantoj fare de Olivier TZALT, kiu aldonis al sia programo kelkajn tre belajn kantojn en la franca kaj en la provenca lingvoj. Gratulojn!

JPC

TOUL ★

S-r^o Greiner multobligis kaj disdonis en lernejoj 140 flugfoliojn por proponi E^o-kurson. Kurso funkcias nun kun 25 entuziasmaj geknaboj. S-r^o Greiner devis rifuzi pliajn lernantojn pro la malvasteco de la Klasĉambro.

NANCY ★

Krom la eldono de la nova E^o-prospekto, kies naskiĝon ni anoncis en la lasta INFORMILO, la Turisma Oficejo en NANCY akceptis pagi tutpaĝan anoncon en la Jarlibro 1979a de UEA. Kiel kutime la loka Junulara kaj Kultura Domo ankaŭ pagis tutpaĝan anoncon, do 2 paĝoj por NANCY. Ĉu aliaj E^o-delegitoj cerbumos, kiamaniere atingi, ke ankaŭ pri ilia urbo aperu turisma prospekto kaj (kial ne?) anonco en la Jarlibro:

- PERKORESPONDA KURSO:

La regiona perkoresponda kurso dissendis depost oktobro 54 komunikaĵojn al la regiona gazetaro, el kiuj almenaŭ 23 aperis. Pli ol 100 personoj informiĝis pri E^o kaj 40 novaj gelernantoj aliĝis al la kurso.

- PAROLAJ KURSOJ:

Vespera kurso en la Junuldomo kun 3 gelernantoj (je la 18a45) kaj alia kurso en liceo Georges de la Tour kun 4 gelernantoj.

Duagrada kurso okazas 2-foje monate (lunde vespere) Okazis ankaŭ 2 kunvenoj por lerni kantojn, sed el deko da interesatoj, nur 5 personoj ĉeestis la 1-an fojon kaj 2 la 2-an fojon... ĉu ni devas daŭrigi?

funebro

Nia sindonema samideanino Anna JACQUOT (EPINAL) havis la doloron perdi sian karan patrinon la 7an de januaro. Ni plej sincere kondolencas kaj esprimas nian simpatian an nia samideanino.

les manifestations de	
MARS 79	
à BAR-LE-DUC	
Conférence 20 h. 30 Vendredi	2 POLOGNE D'HIER ET D'AUJOURD'HUI avec diapositives par M. KOSTRZEWSKI Hôtel de Ville - Salle Prévert Club Espéranto de Bar
VEILLÉE 20 h. 30 Vendredi	2 C.S.O.V.P.S.A. Sketches, chansons, musique, Accueil des Jeunes suivis d'un bal folk
MUSIQUE 21 h.	3 ENSEMBLE DE TAMBOURS DU JAPON 14 artistes O SOUWA DAIKO danse, mime, musique

38 personoj el kiuj pli ol 10 infanoj ĉeestis tiun prelegon. Ni taksas tion grava sukceso.

la-grada kurso daŭre funkcias en elementa lernejo Lucien POINCARÉ, en la kadro de la oficiala instru-programo kaj 2a-grada en Collège André THEURIET, respektive gvidataj de S-in° kaj S-r° DENIS.

Ĉi-tiu lasta prelegos fine de marto en Lycée St-Exupéry en St-DIZIER kaj en Majo en UNIVERSITE DU TEMPS DISPONIBLE ĉiam en St-Dizier

kie ferii ?

LA ESPERANTISTA KULTURDOMO EN GRÉSILLON (BAUGÉ 49150) proponas: *

- A/ printempa semajno 11/4...18/4, malfermata al ĉiuj laŭ loĝebleco - renkonto de infanoj (akompanataj de plenkreskuloj - praktika pedagogio)
- B/ unua somera periodo, de la 2a de julio ĝis la 21a de julio - tritemaj prelegoj, diskutoj, praktiko kaj studo de la lingvo, teatra laboro, ekskursoj.
- ... dua periodo, de la 23a de julio ĝis la 11a de aŭgusto - rektmetoda kurso por komencantoj, grupa praktikado, studado de la lingvo (traduko, studado de verkaĵoj, teatro.
- ... tria periodo, de la 13a de aŭgusto ĝis la 1a de septembro - Fot-arto (fotado, rivelado, prezento de fotoj... - folkloraj dancoj, studado kaj praktikado de la lingvo - ekskursoj.

Sesioj de ekzamenoj estos organizitaj, kvankam la celo de la kursoj ne estas la preparado al tiuj ekzamenoj.

ALIGU FRUE.... Petu detalajn informojn kaj tarifojn je la ĉi-supra adreso.



FERIOJ EN ALPOJ

Dum la lastaj ferioj mi konatiĝis kun montara ĉaledo en francaj Alpoj, en LES BOSSONS, apud CHAMONIX. Tiu regiono, nomata "Reĝolando de Monto Blanka", posedas ja multnombrajn eblecojn pri ekskursoj, dekon da telferoj kaj seĝoliftoj, kiuj kondukos vin al panoramoj la plej belaj!

La ĉaledo ne estas tre komforta (ĝi disponas ĉefe pri dormejoj 4-8 litaj, tre malmultaj 2-litaj ĉambroj por paroj frue rezervantaj) Sed la la manĝoj estas bonegaj, la etoso simpatia, la prezoj moderaj (44F tage por kompleta pensio).

Por eksterlandanoj ne scipovantaj la francan lingvon mi povas peradi kaj traduki la informetojn kaj mendojn. Oni skribu AL MI aldonante 3 respondkuponon (5 se vi deziras ricevi plie turismajn prospektojn).

Mi mem planas ferii tie de la 1a ĝis la 14a de aŭgusto 1979. La asocio, kiu posedas la ĉaledon NE KORESPONDAS en esperanto. Ĉiu rajtas rezervi liton en ĝi.

JP COLNOT, 15 rue de Lavaux F 54520 LAXOU

(suite et fin)

... Car en effet ce n'est pas l'anglais de n'importe qui que vous étudiez, mais *l'anglais du roi*. Si vous étiez vous-mêmes rois, vous ne vous rendriez jamais compte que l'anglais populaire existe et qu'il est même beaucoup plus parlé que celui du roi. Seulement vous êtes un jeune homme de 20 ans et vous faites de l'auto-stop sur les routes merveilleuses du Nord et les routiers qui vous prennent n'ont pas été élevés à la cour ni éduqués à l'Université; alors il ne vous reste qu'un moyen d'utiliser votre anglais: *téléphonez au roi pour qu'il vous aide*. Et s'il vous aide, vous aurez vraiment bien fait d'apprendre l'anglais.

Il faut bien conclure une fois de plus qu'on n'enseigne jamais que *la langue de la classe dirigeante*, et que cette langue est d'une prodigieuse inefficacité en dehors de cette classe. Cela a toujours été et sera aussi longtemps qu'il y aura une classe dirigeante. Cependant, en notre époque d'économies, *un tel gaspillage de temps et d'énergie, un investissement si improductif absorbé en vain pour la diffusion et l'étude de l'anglais*, devrait attirer l'attention du public sur la rentabilité de l'enseignement de l'espéranto. Je ne puis faire plus ici que de suggérer aux espérantistes d'axer leur campagne sur l'aspect économique du problème. Il est d'ailleurs facile d'apporter la preuve que l'espéranto est peut-être le moins cher et le plus valable des enseignements de langues.

Je souhaite en tout cas qu'une étude soit entreprise en ce sens et que les contribuables espérantistes l'exigent de leurs gouvernants.

P. JANTON

SI VOUS NE POUVEZ PAS PARTICIPER AU CONGRES DE COLMAR 

A/ vous êtes membre de la Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto:

envoyez votre pouvoir à notre trésorier, M. André GROSSMANN,
5 rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM

B/ vous êtes membre de la Fédération... et membre de l'Union Française pour l'E°:

a - envoyez votre pouvoir à notre trésorier (adresse ci-dessus)

b - utilisez le bulletin de vote inclus dans la REVUE FRANCAISE d'ESPERANTO
placez ce bulletin dans une première enveloppe ne contenant aucun signe extérieur
et fermée, bulletin auquel vous aurez joint le "BON POUR POUVOIR" ci-dessous.

insérez cette enveloppe fermée dans une seconde que vous adresserez au
trésorier...

.... après y avoir porté, au verso, votre NOM et ADRESSE



B O N P O U R P O U V O I R

Je transmets mon pouvoir pour me représenter, lors de l'ASSEMBLEE
GENERALE de la FEDERATION à COLMAR,

à Monsieur (Madame, Mademoiselle)

qui participera au CONGRES.

NOM

ADRESSE

Date:

Signature:



LITERATURA FOIRO

enhave interesa - grafike moderna
dumonata organo de "La Patrolo"

*

AL NIAJ MEMBROJ

Se vi jam pagis vian kotizon por ĉi-jaro, vi trovos en ĉi-tiu numero kelkajn aldonitajn glu-markojn, aŭ eble vi jam ricevis ilin en INFORMILO 24.

Orientfranca
E^o - Federacio
1979

1/ Jarmarko por ĉiuj niaj membroj (federaciaj kaj aliaj)
Vi gluu ĝin dorse de via federacia membro-karto.
(tiucele vi forigu la subpaperon... la marko estas memgluebla)

UFE 1979

2/ Jarmarko por la UFE-membroj. Ĝi estas rozkolora por la simplaj membroj, kaj blua por la individuaj membroj. Vi gluu ĝin sur vian UFE-membro-karton.

MEMBROMARKO
UEA 1979

3/ La membro-mark-folio de UEA konsistas el:
- membro-markoj uzendaj por rilati kun UEA-delegitoj. Ili atestas vian membrecon (gluenda sur ĉiu pet-letero al iu ajn delegito)
- La Jarmarko por la UEA-membroj. Vi eltondu ĝin kaj surgluu sur vian UEA-MEMBRO-KARTON.

U
E
A 1979 U
E
A

se vi ne jam pagis vian kotizon aŭ vian abonon vi trovos en ĉi-tiu bulteno novan kotiztabelon kaj memorigilon, per kio vi povos informi nian kasiston pri via kotizo. Jam ne prokrastu vian decidon kaj urge pagu vian kotizon. Ni memorigas al vi, ke ĉi-tiu n^o de LA INFORMILO estas la lasta sendita al vi, se vi ne pagos vian kotizon aŭ abonon.

bon pour
pouvoir

Diversaj misinformoj akcidente enŝoviĝis en la lasta n^o de LA INFORMILO:

A/ LITERATURA FOIRO aperas ses(6!)foje dum la jaro kaj ne 4... kiel anoncite.

Se vi volas "gustumi" tiun revuon, petu senpagan ekzempleron al:

- Suzanne BOUROT 15bis rue Morel-Payen
10000 TROYES


... vi ne bedaŭros... kaj certe poste abonos!

B/ SENNACIULO ne estas "revue anationaliste"... sed "revue anationale"

renkontoj kun hindianaj esperantistoj

★ ★ ★

(el mia tagkajero)



23-a de julio,

Varmegas. Tamen la suno kaŝas sin malantaŭ blankagrizaj nebulaĉoj. La higroskopio grado tuŝas al 100. Ni veturas al Kanpur, malrapide kaj maldekstraflanke, kiel oni devas veturi en Hindio. En Kanpur estas nenia vidindaĵo. La gvidlibro -kiun Edgar laŭtlege malantaŭ mia dekstra orelo- priskribas industrian, grandegan, popolaŝan urbon, kien turistoj neniam iradas. Kaj ni mem? Kio altiras nin al Kanpur estas la jenaj tri linioj de la Jarlibro 1978 :

Kanpur (Uttar Prades) 1 500 000
D: Aŝvinikumar, matematikisto, House No 408, Indian Institute of Technology, Kanpur-208016, U.P.
FD (matematiko): la D.

Nur tri UEA delegitoj ekzistas en la Hinda Unio, ni decidis laŭvice viziti ilin. S^o Aŝvinikumar estos la unua.

Sed Edgar ekhaltigas la legadon. Liaj okuloj senmoviĝas iom dekstren kaj li heroldas : "Fervoja katastrofo al la dua"



Ĉi tiel pilotoj anoncas ke oni devas turnigi la kapon je 60 gradoj dekstren, do ni ĉiuj obeeme kapturniĝas. Fakte, vera katastrofo, jam tute dekstren je 100 metroj de la vojo, vagonoj amasiĝas, grandaj rustkoloraj radoj minacas la ĉielon, inter la ruĝaj skatoloj de la vagonoj svarmas, kiel formikoj, armeanoj. Mi haltigas la Büyükon (turka nomo kiun ni altrudis al nia germana VW veturilo, ĝi signifas "granda"). Edgar ekelsaltas de la veturilo, fotaparato antaŭ la okulo, Briĵit pliprudente de en la veturilo fotas. Sed tuj aro de kriaĉoj hajlas sur ni. Edgar ensaltas la Büyükon, "rapidu" li krias spirmanke. Mi ekklučas la unuan, la kriaĉhajlo plilautiĝas. Samtempe ni ekvidas ke la soldatoj pafale celas al ni. Ili estas sufiĉe stultaĉaj por pafi -mi pensas, kaj subpremas la bremson. Kiel Indianoj en malbona, malnova vesterno, aretoj de hindiaj herooj alkuregas nian veturilon. Jus antaŭ la alveno de la unua, mi ankoraŭ havas la tempon demandi al Briĵit kaj Edgar: "Kiu el vi havas pli multe da fotoj sur la filmo?". La filmo de Briĵit estas kvazaŭ ĉe la fino, Edgar nur faris ĝis nun 12 fotojn sur la sian. Bone, la unua oficiro ekalvenas. Li hindilingve kraĉas al mia vizaĝo ke li ekprenis nin ĉe la freŝa faro de spionado. Mi bone rolas la bonfidan turiston, kiu ne komprenas lian lingvaĉon, cetere mi decidis ke mi ne komprenas ankaŭ la anglan. Senutile, ĉar anglalingve li nur konas kelkajn vortojn. Nun ke li estas antaŭ mi, li embarasiĝas. Plurfoje li jam diris ke ni devas elveni de la veturilo kaj li minacas per sia revolvero. Sed mi nenion komprenas kaj alparolas lin ridetante franclingve. La minecanta aro de herooj interdiras hindi-e ke ili malfermos la veturilon per la pafilkolboj, do mi devas agi:

- Ah, foto! mi ekkrias.

- Jes, jes -respondas la suboficiro-. No foto, no, paf paf -kaj li rolas la ĉasiston kiu mortpafas iu-ajn spionon.

- Bone, bone -mi diras, kaj krias al Edgar doni al mi sian fotaparaton.

Antaŭ la silentanta amaso, mi solene malfermas la aparaton, forlevas la filmon kaj enmanigas ĝin al la suboficiro. Li diras al mi ke ni devas kuniri kun li ĉe la komandanto. Kompreneble mi nenion komprenas, ridetas, esperas ke nun, havante la filmon enmane, ili ne kuraĝos pafi al ni, mi ekklučas la unuan rapidumom, kaj, svingante tra la fenestro la maldekstran manon, mi diras:

- Baj-baj.

Li, stulte, levas la manon, kaj ripetas:

- Baj-baj.

Je lia gesto, la amaso malfermiĝas antaŭ ni sur la vojo, kaj ni forveturas. Mi kape doloras. Dum minutoj neniu diras ion. Kiam ni eniras Kanpur-on, pluvegas. Sub la musonpluvego ni provas trovi la "INDIAN INSTITUTE OF TECHNOLOGY". Neniu ŝajnas koni ĉi-tiun grandan kaj faman universitaton, nek angle, nek hindie. Profitante la mallongan ekhalton de la pluvo, mi forlasas la veturilon, ĉar mi ekvidis "sikh"-an turbanon. Laŭkutime la Sikhoj estas pli inteligentaj ol la Hinduoj. Li estas bela juna Sikha knabo, verŝajne studento. Mi alparolas lin pengabie, en la lingvo de la Sikhoj. Li rediras koncentriĝite: "IN-DI-AN INS-TI-TUTE OF TECH-NO-LO-GY", kaj, post kelke da rediroj, siaj okuloj ekfajras de kompreno:

- Aj, aj, ti (I.I.T.) -li diras.

Eblas -mi pensas. I.I.T. fakte estas la mallongigo de la INDIAN INSTITUTE OF TECHNOLOGY, do mi ŝanceliĝas la kapon kvazaŭ oni diras "ne" ĉe ni en Francujo, sed, ĉi tie, ĉi kapsigno signifas "jes". La juna Sikho haltigas aliajn preterpasantojn, petas informojn kaj iom poste kapablas klarigi al mi la vojon. La I.I.T. ne kuŝas en la urbo. Do ni devas forlasi la malpurajn kvartalaĉojn kaj retroveturi la straton celantan la fervojkatastrofon. Kion diros la soldataro kiam ili revidos la Büyükon, ĉar ili nepre revidos nin, la orangkolora Folksvagen estas videblega.

Repluvegas. Kio faladas el la ĉielo havas la saman nomon, sed tute ne aspektas same el nia pluvo. Eĉ se vi imagas la aŭton sub via akvokrano, vi ne trafas la veron. La fama franca verkisto LANZA DEL VASTO priskribis ke, tagon, kiam li piediradis tra la hindia kamparo, la musonpluvego ektrafis lin kaj la kota akvoventa miksaĵo forĵetis lin de sur lia vojo je plurdekoj da metroj. Li eĉ timis la mortadon.

Ni morti ne timis, sed tra la ventoŝirmilo ne multe vidis la vojon. Kiam musonpluvas en Hindio, oni pli malbone vidas ol, hejme, en densa nebulo. La eno de la veturilo sonoras kiel ĝaztamburo. La ĉielo nigras kaj la vojo inundiĝas per brunflava akvaĉo. La homoj, la bestoj, la birdoj, kaj eĉ la muŝoj ien forsvenas. Vi povas preterpasi je 10 metroj vian celon sen vidi ĝin. Se oni povus malfermi la fenestron por vidi ion, aŭ por meti ian ajn demandon, oni tuj ekhavas akvaĉon ĝis la fundo de la pantalono. La tapiŝo de la aŭto, kiel kvazaŭ spongo, grandgute ŝvitas kiam niaj piedoj ĝin ekpremas. La grundo, la humida kreskaĵeroj, la forputriĝantaj bestokadavroj feke odoraĉas. Oni pli rapidus piede, se oni povus piediri.

Sed, kie tiu AJ-AJ-TI de malfeliĉo? Ĉu ĝi estas moderna betondomego kiu similas al ĉi-tiea fabriko, aŭ ia kampuso, luksa vilaĝo por merituloj de la spirito? Post du horoj, veturinte tien kaj reen, ĉirkaŭ kaj en la urbo, ni vidis ke ĝi estas kampuso, kaj feliĉe ni eniĝis laŭ la ĉefstrateto kaj... PUM-BUM! - PUM-BUM! -...

- Io rompita?

- Ne, sed atentu, ĝi estis malbenita rapidrompilo.

Ah, la "spidbreker", eble angla, eble hindia malkovraĵo, dika betonkolbaso barante la ŝoseon, kaj sammomente ekrompante vian rapidon kaj vian veturilon. Mi trovas pli bone nomi ĝin "aŭtorompilo" ol "rapidrompilo". Kiam ni revenis Messon, ni vidis ke oni ankaŭ kuŝigis rapidrompilon tra la ĉefa vojo de la messa universitata kampuso.

La kampusvilaĝo estis granda, sufiĉe pura kaj beleta. Ni malfacilis en la trovado de la domo de S^o ASvinikumar, matematikisto, UEA delegito de Kanpur, kiam ni vidis instruistotipan homulon promeni laŭ la vojo sub nigra ombrelo. Nur pluvetis. Mi haltigis la veturilon.

- Ĉu, sinjoro, vi konas la domon de S^o ASvinikumar?

- Jes, lia bopatro mi estas, kion vi volas pri li?

- Ni estas francaj esperantistoj, ni nur volas lin vidi kaj saluti.

Li ŝajnas nekredante. Eble li ne konas la vorton "esperantisto", sed lia angla scipovo estas tre bona: repeti, kion mi ĵus diris, en alia lingvo, povus esti insultante. Sed aliflanke, li estas familiano de UEA delegito... do, mi rediras la lastan frazon en Esperanto. Li rigardas min ridetante, pardonpetante: "Pliz?" ("mi petas"). Bopatro de UEA delegito ne parolkapablas Esperante? Fakte, ĉu mia bopatro... ?? (reveninte el Hindio, je Kristnasko, mi donacis al li unu "Racia Kurso"-n, kredu min, li tuj komencis trastudi ĝin, tamen li aĝas 76 jarojn! - Pensu pri viaj geparencoj!)

Li kondukas min ĝis la domo de S^o ASvinikumar. Mi iras sola ĝis la pordo. Mi komencas alparoli Sinjorinon, la edzinon de S^o ASvinikumar. Ankoraŭ ŝi, tamen tre bela ŝi estas, ankoraŭ ŝi ne parolas Esperante. Ĉu la delegito mem parolas la lingvon, aŭ pli bone estus se mi alparolus lin angle? Finfine li alvenas. Ho! la bela viro! Mezalta, nigrabarba, arjantipa, bonkasta hinduo, kun tre brilaj inteligentaj okuloj, larĝa frunto kaj belaj manoj. Li parolas esperante pli bone ol mi. La unuan fojon en mia vivo mi parolas Esperante kun neeŭropano. Ĉiujn vortojn mi komprenas. Esperanto ege superas la anglan. Briĵit, kiu dum pli ol unu jaro loĝadis en Usono, kaj jam antaŭe tre bone parolis la anglan, post trisemajna trejnado, nur malfacile komprenas la Hindianojn kiam ili angle parolas. Kiam ni interparolas angle kun Hindianoj, ni malsame eldiras la sonojn aparte anglajn, ĉi tiuj sonoj ne ekzistas en Esperanto. S^o ASvinikumar antaŭ mi estis la vivanta pruvo ke hindia gorgo formas tiel bone la 28 Esperantajn sonojn kiel la nia.

Sed ni ĉiam estis sur la sojlo. Videble li ne tro emis envenigi min. Anglaj manieroj. Li volas scii kion ni volas, precize, antaŭ ol envenigi min. Kaj pluvetas. Lia malfido, tamen kompreninda, iom tudas min. Jam mi pensas adiaŭi kaj repreni la stiroradon, finfine: li estas delegito aŭ ne? Pacience ne estas eŭropana virto, eble eĉ ne katolika. Kristo mem ekprenis la nodoŝnuron por forbati la komercistojn el la templo. La hindo eble eksentis miajn nigrajn ideojn kaj enkondukas min. Mi demandas la permeson venigi mian familion. Por certigi ke reale ni volas neniam servon, S^o Aŝvinikumar sciigas al mi ke li loĝadis en Nederlando, kie li lernis Esperanton, kaj nur pro ĝentilece li akceptis la delegitecon, cetere -li donas al mi la lastan pruvon ke li tute ne intencas tediĝi pro nekonataj esperantistoj- cetere li eĉ ne respondas al leteroj. Mi pensas al mia letero, skribita al la delegito de Nov-Delĥio, je kiu mi ne ricevis respondon. Mi komencas kompreni... Mi diras ion, eble: "bedaŭrinde", eble "mi ankaŭ estas delegito, sed respondas al ĉiuj leteroj", eble mi diris nenion, mi ne plus bone memoras.


Ni interbabilas pri ĉi-tio, france, dum la tempo kiun ni pasas sole en la granda akceptoĉambro. Li estas ŝanĝanta siajn vestojn. La kialon mi ne komprenas, li estis tre bone vestita, verŝajne li fartas pli bone kun niaj maltaŭgajoj surdorse. Fakte, li revenis eŭropmode vestita. Ni interbabilas. Li mallaŭdis la sintenon de la soldatoj, sed mi ne povas malhelpi min ke, se la soldatoj estus metintaj nin en malliberejon, li estus farinta nenion, li nur "proĝentilece" estas delegito, por ke UEA povu reklami en la jarlibro UEA-delegiton en Kanpur.

Lia ĉarma edzino preparas al ni ĉiuj teon, kaj hindiajn frandaĵojn. La etoso iom plivarmiĝas. S^o Aŝvinikumar montras, kaj poste donacas al mi primatematikan libron verkite en la internacia lingvo, en la angla kaj en la hindi-lingvo. Mi donas al li la novan esperantigitajn de la "BHAGAVAD GITA". Ni priparolas multe da hindiaj problemoj. Sendube ni interrilatas pli bone ol angle. Li parolas al ni pri la sociaj problemoj en sia lando: Uttar Pradeŝ. Tumulto kaj strikoj abundas (dum la vespero ni malhavas elektron, pro la striko de ĉi-fakaj laboristoj; kaj, kiam la elektro forestas, la ventoliloj haltas kaj oni ne povas dormi en la varmegaj dormoĉambroj). Mia edzino kaŝe esperas ke, kiel kutime ĉe la Sikhoj, S^{ino} Aŝvinikumar invitos nin por manĝi veran hindian manĝaĵon en sia hejmo. Sed S^o Aŝvinikumar estas Hinduo, eble liaj kastdevoj malpermesas ke ni kunmanĝu, eble li mistaksas nin kaj kredas ke ni malsatas la hindiajn nutraĵojn; li diras ke li bedaŭras, sed hejme li ne havas taŭgan manĝaĵojn por ni, do li invitas nin en restoracion. Mi tute ne volas ke li malsparu monon pro ni kaj mi vidas ke li ne volos ke ni pagu nian fakturon, do mi malakceptas la inviton.

Post iom da babilado, li kondukas nin al la gastodomo. Li tre afable priparolas nian venontagan programon. Li kredas ke ni restas en Kanpur. Sed en Kanpur la nura vidindaĵo estis por ni la UEA delegito. Li ŝajnas bedaŭri ke ni foriros tuj la venontan matenon, sed nia programo estas plenstopita, ni domaĝas unu plian tagon por Kanpuro. Ni interradias. Kiam, la sekvantan matenon, ni forlasas la hotelon kaj mi volas pagi, oni diras al mi ke S^o Aŝvinikumar jam pagis anstataŭ ni. Li estu dankata, tamen mi diras al li ke la devo de delegito tute ne estas doni el sia mono. Mi ricevis belan poŝtkarton de S^o Aŝvinikumar okaze la Novjaro, kaj mi ankaŭ skribos al li.

(daŭrigota)

E. de ZILAH




Amikeco trans limoj



distra angelo

KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE:

1 ofte konsultita dum la lasta januaro - 2 tedi, ĝeni / Li akceptis ĉiujn bestojn - 3 Tajlita, polurita ŝtono / Verda sternaĵo - 4 por fortikigi volbon / Fiŝo de Sankto Petro - 5 sufikso pligrandiganta / Estonta batrako / Litero - 6 Dekoracio per nigra kombinaĵo sur arĝento / Dimensio - 7 Speco de hakilo / Narkota (senorde) - 8 Lubrikiga fluaĵo / Ĝin subtenas kolonoj - 9 mortigi / Konjunkcio / Tio impresas senson (radik.) - 10 Konsistigas komparativon / Paŝkomputilo

VERTIKALE: 1 Pajla aŭ tegola / Tiel oni familianiĝas - 2 Nepra por movigi kaj hejti / Por dormigi bebon (radik.) - 3 Laŭ la kolektiva voĉbruo / Glua substanco - 4 Speco de talpedo, kiu vivas en rivero / Kiu povas ĉion (invers.) - 5 Ŝi havas grandan apetiton / Gento - 6 Pronomo / Soifo / Movigi boaton (radik.) - 7 Prepozicio - Ĉiela zono - 8 Litero / Rabofiŝo / Centro de rado - 9 Metala barometro - 10 Ĝi instigas al avido / Seksa sporo.

"SILAB-ENIGMO"

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj" vi plenigu la kolonojn laŭ la donitaj difinoj dekstre. La 1a kaj 3a kolonoj eldonas proverbon, se vi legos ilin vertikale.

ab an an bo do do e ek el et f ga go ib il jo k k ko ko l la la mo mo ni no no no o o
oj or or os per r ra ra ra ri ro ro sa se so ta to to tr u uĝ

+ - + - - - -	agente, delegito
+ - + - -	nigra ligno
+ - + - - -	kies kapo estas dika
+ - + - - -	arbeto kun pikaj folioj
+ - + - -	mallumo
+ - + - -	migranta fiŝo
+ - + - - - -	ventego
+ - + - -	ĉagrena signo
+ - + - - - - -	dekstra flanko
+ - +	plezuro (inverse)
+ - + - - - -	blanka dorno
+ - + - - -	ĝi gakas
+ - + -	nevo de Davido
+ - + - -	valizo
+ - + - - -	por subteni okulvitrojn
+ - + - - -	monta arbo
+ - + - -	atmosfero

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ

KRUCVORTENIGMO: malvarmumi iko formik en roz ost nodo em te ik oteer po dlr ro po pe oo
ambulanc la li menu ad oro pus

SILABENIGMO: tapiŝo inko ovumi mondismo dilati akropolo karmo akrido pruno obei jupo
trajano - "tiom da kapoj, tiom da opinioj"

diversaĵoj

★ URĜA ALVOKO

Se iu el vi iatempе renkontos aŭ estas renkontinta S-r^on Jiri HARTL, kiu g^orlasis sian domon la 14an de novembro 1978, li (ŝi) bonvolu averti senprokraste lian edzinon:

S-in^o HARTL
chemin de Montelly 21
CH 1007 LAUSANNE Suisse

Identiga priskribo: 56-jara / 1,83m alta / griz-nigraj haroj / okulvitro;
propra signo: dika veruko sur la nuko dekstre slava tipo / bone parolas franclingve kun slava akcento iomete la germanan lingvon / posedas "vojaĝ-titolon BERNE 1969" / diplomon "Inĝeniero pri Civila Pioniraro el el alta politeknika Instruejo en Prago".

P.-S. NE MENCIU tiun serĉo-avison al la koncernata Sinjoro kaze de renkonto.
Dankegon!

INTERŜANĜO

Se vi pretus pagi por restado de junaj Bulgaroj en Grésillon, sama nombro de junaj Francoj estus senpage gastigataj en Bulgario.

Se tiu propono interesas vin, bonvolu kontakti kiel eble plej frue:

Gesinj. CIRPANSKI Emil kaj Velurino
ASENOVGRAD
STRATO Sini Vrah 55 BULGARIO

BULGARA FERIEJO

La belega, nova Domo de la Internacia Esperanto-Kursejo en la urbo SMOLJAN jam funkcias escepte de la monatoj aprilo kaj novembro.

Ĉiuj novaj dusemajnaj kursoj komenciĝas la 1an kaj la 16an tagon de ĉiu monato.

— Aliĝdato: por grupoj, tri monatoj pli frue / por individuoj, unu monato pli frue.

Poŝtadreso: INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO
4700 SMOLJAN Bulgario

ĈETU "T-TRIKOTOJN" ...!!!

Restas disponeblaj T-trikotoj pri la 2 lastaj Universalaj Kongresoj. Notu bone, ke novaj T-T pri Lucerno ne eldoniĝos ĉar estas tro granda ŝtoko el la 2 unuaj eldonoj.

Mendoj kaj informpetoj al:

INTERNACIA POŝTA kaj TELEKOMUNIKISTA ESPERANTO-ASOCIO
Franca Sekcio BP 126
05004 GAP CEDEX

Tiuj "T-T" havis grandan sukceson en Rejkjaviko kaj en Varna

La sama "eldonisto" proponas al vi okultrafajn afiŝojn por anonci kursojn kun sloganoj kiel: "Pour enfoncer... Des clous et un marteau!"
Pour se comprendre... l'Espéranto!"